

Heroldo de Esperanto

Semajna neŭtrala organo de la Esperanto-movado. — Senpaga monata aldono: Verda Stelo.

Protektantaro:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
M. Page, advokato, Edinburg
Graet Archdeacon, Paris
John Gill North, komercisto, Barcelona

H. Fischer-Galac, grandindustriisto, Bucuresti
Frans Schoofs, Antwerpen
Paŭlo v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

Administracio:

Horrem bei Köln, Germanlando.

Cefredaktoro: Teo Jung
Redakciaj kunlaborantoj en la tuta mondo.
La redakcio ne resenda manuskriptojn.

Prezo de Abono:

Jarabono: egalvaloro de 15 sv. fk.
Duonjara abono 7,50 sv. fk.
Unu n-ro 0,40 sv. fk., 10 n-roj 3 sv. fk.
Specimena numero senpage.
Petu nian Tarifon kun specialaj prezoj en diversaj valutoj!

Prezo de Reklamo:

po unucifetra kolonero egalvaloro de 2 — sv. fk. (antaŭpage 1,50 sv. fk.)
Anoncoj po enpresado kaj komencita 10 vortoj egalvaloro de 0,60 sv. fk.
Poŝteka konto: Köln 781 02, Heroldo de Esperanto.

Agentejoj en Antwerpen, Athenaj, Barcelona, Bucuresti, Budapeŝt, Bydgoszcz, Helsinki, Hr. Králové, Leningrad, Liverpool, Lisboa, Montevideo, Paris, Riga, Rio de J., St. Gallen, S. Francisco, Sofia, Stockholm, Tallinn, Warszawa, Zagreb, Zeist.

Rusaj sciencistoj kaj Esperanto.

Okaze de mia raporto al Tutsovetunia Akademio de Sciencoj mi ricevis multajn leterojn kun petoj informi pri rezultatoj atingitaj ĉe la grandsciencula rondo. Responde al tiuj, mi devas antaŭ ĉio sciigi, ke la demando starigita antaŭ la Akademio ne jam estas priiraktita. Sed ni jam akiris tie amikojn por Esperanto.

La penso pri propaganda raporto al la Akademio naskiĝis ĉe mi antaŭ longe, kiam okaze de la 200-jara jubileo de la Akademio en la rusa gazetaro aperis artikolo de akademiano N. J. Marr, direktoro de Leningrada Publika Biblioteko kaj Jafetidologia Instituto, en kiu li argumentadis pri neceso kaj utilo de mondhelpingvo. Poste en la gazetaro estis presita sciigo pri decido de la Akademio preni sur sin klopodon restarigi la antaŭ la milito ekzistantan internacian konsilantaron de Akademioj.

La perspektivoj ŝajnis uzeblaj por la laboro kaj, ĉar la scienco ĝis nun donis al la demando pri mondhelpingvo nenian difinitan respondon, mi decidis eniri en la sciencpreĝejon por fosi tie nian sulkon.

La sukceso de la unuaj paŝoj estis granda; ĝiajn rezultojn ni jam havas, kaj ili estonte devas pligrandiĝi.

Akademiano S. F. Oldenburg, sekretario de la Akademio, prenis sur sin la taskon informigi pri la problemoj en alilandaj Akademioj.

Tolstovski-muzeo, ĉe la Akademio, akceptis proponon uzi Esperanton praktike kaj jam korespondas ĝin oficiale.

En Regna Publika Biblioteko nun estas aranĝata aparta Esperanto-fako.

La SAT-kongreso, okazinta en Leningrad pasintan aŭguston, ricevis de la Akademio gravan salutskribon.

Pensoj publikigitaj en rusaj gazetoj plej bone karakterizas niajn amikojn en la Akademio. Jen estas traduko de unu artikolo, kiun akademiano A. E. Fersman skribis sub titolo „Esperanto estas vojo al progreso de scienco“:

„Lingvo estas unu el la plej potencaj iloj por rilatoj inter la popoloj. Diverslingveco estas unu el la ĉefaj malhelpoj starantaj sur vojo al unuiĝo de laborantoj en la tuta mondo. Krei unu solan lingvon en internacia skalo, tio signifas elimini la malhelpon.

Garantio por sukceso de Esperanto estos konservo de la kondiĉoj utiligi vortradikojn el lingvoj de ĉiuj nacioj. Prilaboro de tiuj radikoj, kiuj devas servi al estonta evolucio de Esperanto, estas serioza scienca laboro.

La Akademio de Sciencoj, stariginta kiel ĉefo por scienca agado de Sovetunio, ne povis, certe, lasi senatente ĉi tiun plej necesan sferon de la tuthomara scio. Ĉe la Jafetidologia Instituto laboras kun la sekretario de l' Akademio, S. F. Oldenburg, sub prezido de akademiano N. J. Marr, komisiono, kiu studas la historion de la formado de apartaj lingvoj kaj esploras parencajn vortradikojn.

La rezultoj de tiuj laboroj de la nomita komisiono, se oni atentis, ke en ĝi kunlaboras tiel eminentaj specialistoj de lingvoscienco kiel S. F. Oldenburg kaj N. J. Marr, promesas grandegan valoron.

Esperanto estas la plej serioza provo krei artefaritan lingvon, komunan por ĉiuj popoloj. Scienculoj de la tuta mondo, vidantaj la sekvantan ekfloron de la sciencaj objektoj en plikreskanta unuiĝo de vastaj popolamasoj, el kiuj la scienco ĉerpas la fortojn por sia sekvonta ekfloro, devas saluti Esperanton, kiel unu el la vojoj al plifortigo kaj pligrandiĝo de la unuiĝo.

Por la scienco estas eksterordinare grave, ke la plej uzataj terminoj kaj esprimoj estu unusignifaj por ĉiuj popoloj, ĉiuj landoj kaj ĉiuj nacioj. Al Esperanto estas promesite triumfi, kondiĉe ke ĝi fortiĝu la interligojn kun sciencoj studantaj la

historion de lingvoj. Esperanto, estante artefarita lingvo, eniros en korpon kaj sangon de l' popoloj de la tuta mondo, se ĝi atentis ĉiujn faktojn de tio, ke lingvo de ĉiu popolo estas historie okazinta fenomeno.

Kreado de la sola internacia lingvo forigos ankaŭ unu el la malhelpoj al vasta unuiĝo de scienculoj kaj helpos disvastiĝi en la popolamasoj sciojn.

La citaĵo pravas, ke ni bonvenis. Ni povus tie fortiĝi la interligojn. Ĉu deziras tion la tutmonda esperantistaro?

Paul Poniševski, Leningrad,
Prosp. de 25 Oktobro, 74-19.

Letero el Aŭstrio.

Wien, febr. 1927.

Esp. aferoj.

La Esp. Delegitaro de Wien, al kiu nun apartenas 15 kluboj neŭtralaj, inter ili la ĉiam plej bone vizitata „Danubio“ kun 80 membroj, okazigis en komenco de februaro sian 60-an monatan kunvenon. Sano Smit el Holando deklamis mem verkitaĵojn poemojn en la societoj. La komitato por Tutajstaj Esp. Kongreso dum pentekosto komencis funkcii. Detalojn oni publikigos ĝustatempe. Por koncentriĝo de la movado en nia urbo estas proponite fondi „Esperanto-hejmon“.

La centro de pan-eŭropa movado kunvokos samideanojn kaj aliulojn kun la celo (kondiĉe ke la aferoj bone prosperos) fondi esp. sektion. La dua kongreso okazos dum oktobro en Bruxelles, Belgujo.

Laŭ la polica modelo, ankaŭ la direkcia de la urbotramoj decidis deĵorigi lingvokapablajn kondukistojn la unuan fojon okaze de la Printrampa Foiro dum la tempo de 13—19 marto kaj la duan fojon dum la Vienaj festsemajnoj, komencotaj la 5 junio kaj daŭrontaj ĝis 19 junio. La koncernaj kondukistoj portos rubandojn kun surskribo de la parolataj lingvoj, kaj Esperanto ne mankos. Pri la festsemajnoj la esperantistaro konatigos programojn en la koncernaj gazetoj; jam nun ĝi petas eksterlandanojn, kiuj intencas partopreni, anonci sin ĉe la fremdultrafikejo de la urbo Wien.

La laboristaj societoj aranĝas sinsekve lumbildparoladojn kaj sub la devizo „Kultura vespero“ laŭdindajn entreprenojn, al kiuj sin dediĉas multaj gesamideanoj kun vera entuziasmo kaj oferemo.

En Radio la preleganto ĉiam rakontas en Esperanto pri aktualaj aferoj. Laŭ la gazetoj oni fakte konstatas, ke post la Novjaro la abonantaro ĉe „Ravag“ iomete plimalaltiĝis.

Diversaj aferoj.

Sciencistoj el Argentino vizitas nian urbon por konatiĝi kun la diversaj sciencaj institutoj.

Oni diras, ke la violon-virtuozo Vasa Pihoda, kiu sin prezentis ĉe „Ravag“ (Radio), devis pagi por sia muzikilo pli ol 100 000 aŭstrajn ŝilingojn.

Kiel direktoro de Viena muzik-akademio estas elektita Prof. Max Springer.

„La reĝino“, opereto de Oskar Strauss, estas bunsukcese prezentita. Aktoro de „Burgtheater“ R. Aslan estonte ludos en ĝi la respublikan prezidanton.

W. R.

Letero el Hungarujo.

Budapest, februaro 1927.

Fine de januaro estis granda tago de hungara historio: denove kunvenis la hungara parlamento, ambaŭ domoj. La elektoj de la malsupra domo (Deputita Domo), okazis en decembro kaj alportis — kiel oni povis antaŭvidi — grandegan sukceson por la registara partio. En multaj lokoj oni jam antaŭe rifuzis la oficialan akcepton de kandidatoj por deputito, ĉar ia ajn nereguleco en la proponita teksto sufiĉis por tio. En la

plimulto de la distriktoj jam antaŭe nur registara deputita kandidato estis elekta, kaj nur en kelkaj — per sekreta baloto elektantaj — urboj akiris la duonon, kelkloke eĉ pli ol la duonon, de la voĉoj la opoziciaj partioj. Tiamaniere okazis, ke el 245 parlamentanoj 208 estas registaraj kaj nur 37 opoziciaj. Tia forta registara partio ankoraŭ ne estis en hungara parlamento. En la opozicio plej unueca estas la socialista partio.

La supra domo estas grandparte elektita. La reprezentado estas pli vasta ol en la antaŭmilita magnata domo. Ne nur aristokratoj, sed ankaŭ diversaj aliaj klasoj, institucioj, societoj, ekzemple la sciencaj universitatoj, la kuracistaj societoj, ktp. povis elekti reprezentanton. La unuan fojon — laŭ akceptita leĝo — havas elektitajn reprezentantojn la ortodoksa kaj la reforma judaj eklezioj de la lando. Kiel antaŭe la reĝo, nun laŭ propono de la registaro la „gubernatoro“ Horthy nomis parton de la membroj por la supra domo.

De la unua de januaro cirkulas la nova mono, la pengo. Post multaj jaroj la homoj denove lernas kalkuli en malgrandaj nombroj kaj havas kuprajn kaj arĝentajn monerojn en la poŝoj. Nur la kalkulo el la ankoraŭ valida malnova krona mono al pengo estas malfacila kaj kaŭzas embarasojn. Unu pengo egalas 12500 malnovajn kronojn. Komprenoble oni uzis la transkalkulon por karigi kelkajn komercaĵojn kaj prezojn — rondigante la ciferojn. Eĉ la kotizoj de Hungarlanda Esperanto Societo kaj de UEA estas pli alten rondigitaj. Sed la ekonomia situacio ne pravigas tion, kvankam pro statistikaj laboroj kaj pro laboramasigo en bankoj, oficejoj kaj komercejoj ĝuste dum la periodo de transkalkulado el kronoj al pengoj, multaj senlaboruloj trovis provizoran okupadon. Ankaŭ la valorpaperoj atingis pli altan prezon en la borso. Amuzejoj estas grandparte plenaj. Se multo mankas, granda parto de la loĝantaro tamen volas amuziĝi en libera tempo. Tamen ne ĉiuj amuzejoj profitas.

La registaro esperas per sia nuna forto sukcesan laboron kaj deziras resanigi la tutan landon ekonomie, morale kaj kulture. Oni multon parolas kaj skribas pri fremdultrafiko, aliŝtataj kunlaboroj, kongresoj, ekspozicioj, partopreno en eksterlandaj aferoj. Nun malfermiĝis eksterlandafera seminario aranĝita de la eminenta Societo por Eksterlandaj Aferoj, kies prezidanto estas grafo Apponyi.

Kelkfoje oni babilas pri estonta reĝo-elekto. La filo de mortinta reĝo Karlo (Otto) vivas kun patrino Zita en eksterlando. Kiuj parolas pri laŭleĝa daŭrigo de la regado, opinias, ke Otto estas la nuna reĝo. Aliaj pensas, ke la lando nun havas la rajton elekti reĝon alian, ĉar la kelkjarcentaj kontraktoj kun Aŭstrio ĉesis. Multaj aliaj, komprenoble inter ili la socialistoj kaj radikaluloj, dezirus respublikon kaj ŝtadfederacion pacan kun la najbaraj landoj. Ankaŭ pri tio oni parolas, ke alia Habsburgano Albrecht, filo de Frederiko, junulo ankoraŭ ne multe konata eksterlande, edzinigos eksterlandan princinon kaj estos elektata kiel reĝo. Per tio oni eĉ esperas pli fortan ligan kun najbarlando. Albrecht faris viziton ankaŭ en Romo, kaj nun la hungara registarestro, grafo Bethlen, vizitas Mussolini. Sed publike oni ne scias ion.

La foiro de Budapeŝt, kiu estas jam de kelkaj jaroj tre sukcesa kaj vere internacia, faras grandan propagandon en eksterlando kaj esperas allogi fremdulojn. Oni donas dum ĝia tempo (30 aprilo ĝis 6 majo), diversajn rabatojn al vojaĝantoj. Tiajn rabatojn povas ricevi eĉ privataj pli grandaj grupoj iam ajn kune vojaĝantaj.

Oni esperas ke, se ne okazos ia katastrofo en ia ajn rilato, la lando povos dum kelkaj jaroj videble resaniĝi kaj efike kunlabori en la mond-kulturo. Du verkistoj, Molnár kaj Heltai, nun ricevis la francan ordenon de la Honora legio.

K. S.

Letero el Palestino.

Laborvivo en Palestino.

Antaŭ ol mi skribas ion pri la laborkondiĉoj en Palestino, la klareco postulas, ke mi komprenigu la nunan situacion de mia patrujo.

En Palestino, kiu estas lando malgranda kaj malriĉa, pro manko de akvo kaj karbo ne povas esti disvastigata fabrika industrio. Tial la klaso de fabriklaboristoj forestas. La ĉefa vivrimedo de palestinano, arabo, estas la tero. Sed la situacio ŝanĝiĝis antaŭ 10 jaroj. Granda enmigrado de hebreoj al malnova patrujo, 2000 homoj enirintaj ĉiumonate Palestinon kreis en mallonga tempo ĉirkaŭ 100 koloniojn kaj grandan urbon, Tel-Aviv (Printempa Monteto), je la bordo de la maro.*

Nun estas klare, ke laboristoj de Palestino dividiĝas je du ĉefaj grupoj: 1. konstruistoj, 2. terlaboristoj.

La unua klaso, konstruistoj, vivas kune kaj havas unu komunan kason, la anoj de tiaj „Gdudoj“ (batalionoj) laboras ok horojn ĉiutage, ricevante: simpla laboristo 20—25 piastrojn (20 piastroj = 1 dolaro), profesiisto 50—80 piastrojn. La mono eniras en komunan kason, kaj la administracio zorgadas pri la bezonoj de siaj laboristoj. Tiel, ili enkondukas je la vivo la bonkonatan devizon: „Donu laŭ kapableco kaj ricevu laŭ bezono!“

La plej granda „Gdud Haavoda“ (Laborbataliono) estas en Jerusalemo. En pli multe ol 50 dometoj loĝas ĉirkaŭ 500 gelaboristoj. Pli malgrandaj estas en Tel-Aviv kaj Haifa.

Dum la dek lastaj jaroj la situacio de ĉi tiuj „batalionoj“ estis bona; sed per ekonomia krizo, kiu venis kune kun la ĉeso de la enmigrado en komenco de 1926, ĝi ekmalboniĝis, kaj tial la labormovado estas nun malhelpata.

Krom tiuj batalionoj, la laboristoj estas ankaŭ organizitaj je t. n. „Kvucoj“, kiuj prezentas grupon de 20—30 laboristoj ordinaraj, aron de samprofesiaj. Ili ankaŭ vivas komune.

Eĉ laborista arabo, kiu pro siaj primitivaj bezonoj kontentiĝas per 10—8 piastroj ĉiutage, tamen ne povas konkuri kun la „batalionoj“, ĉar reciproka helpo de batalionanoj kaj modernaj maŝinoj starigas ilin ekster la konkurado, dum al la „Kvucoj“ la konstanta konkurado de araboj tro malutilas. Nun oni gvidas grandan propagandon inter hebreoj kaj araboj pro t. n. „Ahdut Haavoda“ (Kunigo de Laboro).

Pli bona estas la situacio de la dua klaso, la terlaboristoj. Inter ili estas du kategorioj: a) laboristoj memstaraj, laborantaj je la terpeco ricevita de Keren kajemet le-Israel (Hebrea Nacia Kaso) kaj b) la taglaboristoj ricevantaj laboron de la vilaĝanoj. La laboristo en kolonio ne ricevas pli ol 15—18 piastrojn ĉiutage, sed li havas la sekvantajn preferojn: 1. La vivo en kolonio estas pli malkara ol en urbo, 2. la fantomo de senlaboreco ne staras post liaj ŝultroj, kaj 3. araboj ne povas konkuradi kun hebrea laboristo en vilaĝo.

La plej grandaj komunaj kolonioj estas: En-Harod Tel-Josef (nomita tiel je la memoro de Josef Trumpeldor, la heroo de la defendo de Galileo)

* Mi parolos nur pri hebrea laboristoj, ĉar araboj ne estas organizitaj kaj tial mi ne povas doni pri ili precizaĵojn.

kaj Kfar-Jeheskel. Ili estas nun la modelaj kolonioj en Palestino, laŭ fruktodono kaj vivordo. Kvin jarojn antaŭe tiu ĉi distrikto estis unu granda marĉego, nesto de nekurablebla malario. Sed per neordinara sindono de la pioniroj-laboristoj, kiuj kun danĝero por sia vivo sekigis la marĉojn, nun tie estas certa Edeno.

Kaj fine interesinda detalo. En urbo kiel en vilaĝoj, ne nur la laboristoj-gepatroj vivas kiel unu „rondo familia“, sed ankaŭ la infanoj. La sistemo de la komuna edukado de infanoj estis enkondukita en la komunaj kolonioj kaj „batalionoj“ de Palestino laŭ vidpunktoj idealaj kaj praktikaj. La patrino estas tre okupata per malfacila laboro kaj ŝi ne havas nek eblecon nek tempon doni al sia infano la bezonatan zorgadon, dum en la infanejoj, kiuj estas mastrumataj laŭ la plej modernaj principoj, la infano ricevas bonegan kaj sanan edukadon.

Konstruistoj, terlaboristoj kaj oficistoj estas ĉiuj anoj de Ĝenerala Hebrea Laborista Organizo, kiu havas ĉirkaŭ 25 000 membrojn kaj estas proks. 20% de hebrea loĝantaro en Palestino. Ili eldonas ĉiutagan gazeton „Davar“ (Vorto) kiu aperas en 10 000 ekzempleroj kaj estas unu el la plej riĉaj gazetoj en Palestino. P. Hein.

Rim. de red. — Traduko kaj represo de la „leteroj“ aperantaj en Heroldo estas permesata kaj dezirinda.

Mistera afero.

Ĉu miskompreno, mistifiko aŭ kio ajn ĝi estas — ni ne scias. Ĉiukazela afero estas mistera. Temas pri la laŭdira konsekro de s-ro ing. Preben Wenck el Köbenhavn (Danujo) je pastro de la antikva-katolika eklezio, pri kiu ni raportis en Heroldo n-ro 60 de 1926 kaj en Verda Stelo de decembro 1926. La sciigo venis de Sudslava Esperanto Servo, kiu estis al ni konata kiel fidinda fonto. Des pli ni miris kaj indigniĝis, kiam ni aŭdis de s-ro P. Jörgensen, ke li havis intervjuon kun s-ro Wenck, en kiu la dana inĝeniero diris, ke la sciigo pri lia konsekro je pastro estas fantazio. La intervjuon ni publikigis en nia n-ro 1 de 1927. Post tio Sudslava Esp. Servo sendis al ni denove raporton pri la afero, aldonante rimarkon ne tre afablan sed en sia motivo kompreneblan same kiel la rimarko de nia redakcio — cetere en nia rimarko ni senkulpigis la „falsan sciigon“ per miskompreno. Miskompreno certe okazis aŭ mistifiko, kiel ni supre jam diris. Kiu aŭ kio estas kulpa pri la miskompreno aŭ mistifiko, tion espereble malkaŝos la estonteco. Ĝis nun la afero restas neklara kaj mistera.

Ĉi-sekvante ni publikigas la klarigon de Sudslava Esp. Servo kaj la tradukon de du artikoloj presitaj en la dana gazeto „Berlingske Tidende“:

Ankoraŭ pri Es. onto de la antikva-katolika eklezio.

Traleĝinte la raporton de s-ro P. Jörgensen en la n-ro 1 (1927) de la Heroldo, oni vidas ke, laŭ vortoj de s-ro Jörgensen, la tuta konsekro de s-ro ing. Preben Wenck por la pastra posteno estis nura „ŝerco“! Ne estas eĉ miro, kiu nin kaptis dum la legado de la raporto de s-ro Jörgensen, estas vera indigno . . .

La tutan riton gvidis nia samideano, lia episkopa moŝto Marko Kalogjera, membro de la Int.

Sciencia Asocio Esperantista, en ĉesto de kelkaj dekoj da esperantistoj el Zagreb. Inter ili estis la adeptoj de la roma-katolika, greka-ortodoksa kaj juda religioj. Ĉeestis, kvankam kompreneble neoficiale, la prezidantaro de la Sudslava Esp. Ligo, Zagreba Societo k. a. La esp. tekston de la konsekro trarigardis de la lingva vidpunkto Sudslava Esp. Servo. S-ro Preben Wenck plej pie plenumis ĉion laŭ la rito, post kiu, jam vestite en la pastra vesto, li faris solenan predikon en la germana lingvo. La tuta rito estis kelkfoje fotografita.

Pri la okazintaĵo raportis, laŭ la oficiala peto de la Kroata Antikva-Katolika Eklezio, ĉiuj Zagrebaj gazetoj.

La parolado de episkopo M. Kalogjera pri Esperanto tute ne estis destinita por iaj ĵurnalistoj — ĝi estis parto de lia prediko al la preĝantaro kaj estis farita en la kroata lingvo.

Cetere la formalan verecon de la raporto de s-ro Jörgensen klarigos la kancelario de episkopo M. Kalogjera per la rekta rilato al s-ro Preben Wenck.

Ĉi tie ni nur atentigas pri la karakterizo de nia unua raporto kiel „falsa sciigo“ (en la rimarko de la redaktoro). Ĝi ŝajnas elpaŝi el la limoj de la minimuma ĝentileco, kutima inter la edukitaj homoj. Ni esperas, ke estas ankaŭ aliaj vojoj por rebati la ŝajne falsan sciigon, krom la tuta publikigo de la nekontrolita kaj moke-ataka kontraŭ-raporto. Sudslava Esperanto Servo.

El „Berlingske Tidende“, 19. 12. 1926:

Dana arkitekto kiel antikva-katolika pastro. La preĝo estis legata en Esperanto.

„Heroldo de Esperanto“ informas, ke la juna dana arkitekto Preben Wenck je la 21-a de novembro en Zagreb (Agram) estas konsakrita kiel pastro en la antikva-katolika eklezio.

La konsakro estas gvidita de episkopo Marko Kalogjera, la kroata ĉefo de la eklezio, je granda pompeco. Ĉar la juna pastro pro sia nacieco rifuzis la uzadon de la germana rito, la preĝoj estis legataj — unuan fojon — en Esperanto, kiu antaŭ nelonge estas akceptita kiel internacia lingvo de la antikva-katolika eklezio.

Pastro Wenck, kiu estas filo de la eminenta ĉefarkitekto de la ŝtataj fervojoj, profesoro H. Wenck, pasigas la kristnaskan tempon en sia hejmo, en Charlottenlund.

Onidire li estas destinita fondonto de dana antikva-katolika eklezianaro.

Trad. Poul Jörgensen.

El „Berlingske Tidende“, 20. 12. 1926:

La antikva-katolika eklezio.

Neniu pastro kaj paroĥo en Danlando.

Estas bazita sur granda erarkompreno la hieraŭa informo de „Berlingske Tidende“, ke mi fariĝis antikva-katolika pastro ktp.

Mi supozas, ke tiu fantaziplena raporto ekiĝis pro miaj esploroj de la evoluado de la antikva-katolika eklezio en Kroatio.

Mi laboras en la gazeta servo de la sudslava ministerio de eksterlandaj aferoj, kaj dum la aŭtuno mi restis kelke da tempo en Zagreb por

— Tion vi diris jam tiel ofte, kvankam vi bone scias, ke mi ne kuraĝas.

— Iam li tamen ekscios ĉion.

— Eble.

— Ĉu Eduard ne parolis denove pri via geedziĝo?

— Jes, ofte; sed ĉiufoje mi trovis pretekston por prokrasti ĝin. Unue mi volis atendi, ĝis mi tute resaniĝis; poste mi proponis prokrasti, ĝis liaj okuloj tute resaniĝis.

— Kial do li ne jam delonge aĉetis novajn okulvitrojn?

— Ili jam ne plibonigos liajn okulojn . . .

Denove Berta enpensigis, karesante la lastan leteron de Jozef, kaj sinjorino Kelderman ĝemante forlasis la ĉambron. —

Du tagojn poste je la kvara horo en la posttagmezo, veturilo atendis antaŭ la pordego de la malliberejo, kaj kiam tuj poste Jozef staris libera sub la ĉielo kaj la pordego post li fermiĝis, li rigardis ĉirkaŭen kiel birdo, kiu post longa mallibereco subite estas meita ekster sian kaĝon.

Li rigardis ĉiudirekten, unue supren al la ĉielo, poste al la ĵus fermita pordego, fine antaŭ sin. Li ne tuj rimarkis la veturilon; sed kiam ĝia pordeto malfermiĝis kaj li rigardis internen, li ekvidis elfrontan virinon, kiu donis al li man-signojn vokante lin al si.

— Jempsar! li ekkriis kurante al la veturilo. Li ensaltis, jempsar tirmemis la pordeton, kaj apenaŭ ŝi sidis, ili kuŝis unu en la brakoj de la alia. Samtempe la veturilo ruliĝis for.

— Jozef! kriis la knabino, kaj dum longa tempo neniu el ambaŭ diris plu unu vorton. —

La veturilo rapidis tra Scheveningen, laŭlonge de la arbaretoj, kaj alproksimiĝis al Haag; sed nek Jozef nek Berta atentis la belegajn arbaretojn, starantajn nun en sia plena somera ornamo. Jam dum ses monatoj ili ne premis al si reciproke la manojn: nun sin premis iliaj brusto, vango kaj manoj. Dum la veturado Jozef ne pensis plu pri

49) Jozef kaj la edzino de Potifar

aŭ: Idoj de Merkuro kaj Eroso

Romano originale verkita en Esperanto

de H. J. Bulthuis, L.K.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio

— Kial vi ne rakontas al li la tutan veron?
— Ho, tion mi ne kuraĝas; pli volonte mi mortus.

— Ĉu vi ne volas fariĝi lia edzino?

— Antaŭe mi volonte volis tion; sed nun la nura ekpenso pri la geedziĝo terurigas min.

— Kion do vi intencas fari?

— Mi ne volas fari lin malfeliĉa, tial estas eble plej bone plenumi lian deziron.

— Sed ankaŭ plenumante lian deziron, vi faros lin malfeliĉa . . .

— Mi ja povos ĉiam kaŝi al li la veran senton, kiun mi havas por li.

— Ne, tion vi ne povos.

— Ho sinjorino, li estas tia bonulo . . . eble mi lin amos post nia geedziĝo.

— Tion vi ne faros. Virino povas fordoni sian amon nur unu fojon.

— Vi estas prava; sed kiel do agi?

— Se mi nur scius . . .

— Eble io okazos, kio feliĉe ŝanĝos la situacion.

Sinjorino Kelderman eliris el la ĉambro, kaj Berta restis sidanta sur la kanapo, kaj alterne ŝvebis preter ŝiajn okulojn la bildo de la bonkora, protektanta Eduard, kiun ŝi ŝatis kiel fraton, kaj la bildo de Jozef, al kiu ŝi estis doninta sian tutan amon de virino.

XV-a ĉapitro.

Jozef libera — Sinifero.

Preskaŭ ses monatoj estis pasintaj de post la tempo, kiam Berta ricevis sian duan leteron de

Jozef. Ŝi sidis hejme antaŭ la fenestro kaj ekvidis la leterportiston, kiu de la kontraŭa strato-flanko rekte iris al ŝia domo. La sonorilo aŭdiĝis. Du minutojn poste eniris la ĉambron la vidvino kun letero.

— El Scheveningen, ŝi diris.

— De Jozef! ekkriis Berta. Ŝi legis:

Tio ĉi estas mia lasta letero. Venontan jaŭdon estos pasintaj la ses monatoj, tiam je la kvara horo posttagmeze mi povos eliri mian ĉelon. Ĉu vi venos por atendi min antaŭ la elirejo de la malliberejo? Mia muso mortis antaŭ du tagoj, mi tre bedaŭras, ke mi ne povos kunpreni mian amikineton. Nun restas al mi nur unu. Mi ne scias, kion mi faros kaj kie mi laboros, kiam mi estos libera. Eble vi povos doni al mi konsilon. Mi atendas vin. Ĝis jaŭdo!

Via Jozef.

Tri-, kvarfoje ŝi legis la letereton skribitan kiel kutime per grandaj neregulaj kaj klare legeblaj literoj. Poste ŝi sonorigis, kaj la vidvino denove eniris demandante:

— Ĉu li skribis ion eksterordinaran?

— La muso mortis . . .

— Kompafinda bubo! Nun li denove estas tutsola.

— Jaŭdon li estos libera, kaj mi iros al Scheveningen por atendi lin ĉe la elirejo de la malliberejo.

— Kion poste li faros?

— Mi ne scias, eble li iros al sia patrino, kiu ankoraŭ loĝas en la veturilo . . .

Berta medite rigardis la leteron, kiun ŝi ankoraŭ tenis en la mano, kaj diris post momento:

— Mi veturigis lin al lia patrino.

— Ĉu poste li regule vizitos vin tie ĉi?

— Mi ne scias . . .

— Estu singarda kaj prudenta kaj pensu pri Eduard!

— Mi ja konstante pensas pri li.

— Estus plej bone konfesi al li tutan veron.

studi la tre interesan naciajn-eklezian movadon en Kroatio.

Okazas en Kroatio tre fortega batalado inter la roma eklezio kaj antikva-katolika kroata eklezio. Estas ne nur batalo pri religiaj kaj dogmaj vidpunktoj, estas ankaŭ nacia batalo kontraŭ la roma kaj itala spirita superrego en Kroatio.

Dum mia restado en Zagreb mi ĉeestis la grandan solenan diservon, dum kiu ĉ. 6000 (ses mil) romaj katolikoj unutage aliĝis al la nacia antikva-katolika eklezio. Dum tiu grandioza soleno episkopo Kalogjera faris paroladon en Esperanto, per kiu li dankis min kaj aliajn ĉeestantajjn gazeto-representantojn pro la bona kompreno, kiun ni montris al la movado.

Mi aŭdis, ke la Zagrebaj esperantistoj estis tre entuziasmaj pro tio, ke la citita parolado estis farita en la lingvo Esperanto.

Ĉiu alia komentario de la okazintaĵo estas fantaziaĵo kaj erarkompreno; estas en Kroatio neniu, kiu intencas fondi antikvan-katolikan paroh-anaron en Danlando.

Principe la antikvaj-katolikoj ne propagandas en protestantaj landoj, sed nur en katolikaj landoj.

Altestime

Ark. Preben Wenck, publikiganto.
Tradukis P. Jørgensen.

La aŭtentikecon de la tradukoj atestas

Societo de Danaj Esperantistoj
Margrethe Noll, prez.

La redakcio de Heroldo ricevis la aŭtentikajn eltranĉaĵojn el la gazeto „Berlingske Tidende“.

Tra la mondo.

— La germana parlamento esprimis sian konfidon al la nova registaro kun 235 kontraŭ 174 voĉoj.

— La registaro de U. S. S. R. eknomis la ĝisnunan ambasadoron en Tokio, Kopp, ambasadoro en Stockholm.

— Terura ventego sur la Nigra maro kaŭzis la subakviĝon de la rusa vaporŝipo Batusiov. 40 personoj dronis. Rumana vaporŝipo, sur kiu troviĝis 200 personoj, surteriĝis. Ĉar la ventego malfaciligas la helpon, oni timas, ke ankaŭ tiu ĉi ŝipo subakviĝos.

— La trupoj de la generalo Susa Diaz (Portugalujo) ribelis kontraŭ la registaro, sed ne sukcesis.

— Okaze de studenta demonstracio kontraŭ universitata profesoro en Bagdad ok partoprenintoj estas mortigitaj de kontraŭuloj.

— Proksime de Cagliari la itala poŝt vaporŝipo Memphis subakviĝis. La ŝipano estas savita.

— Laŭ oficiala takso en julio de tiu ĉi jaro, la nombro de la enloĝantoj de Ameriko estos 118,6 milionoj.

— Sur fervoja linio Warszawa-Lwow (Polujo) bruliĝis vagono dum la veturo. Ĉar la vagonaro ne povis esti tuj haltigata, multaj vojaĝantoj elsaltis kaj 40 parte grave vundiĝis.

sia ĉelo, nek pri la trasferita enuo, kaj Berta ne pensis plu pri Eduard. Ili ĝuis sian reciprokan ĉeestadon kaj estis feliĉaj.

Kiam ekhaltis la veturilo, Berta subite pensis pri tio, ke ŝi ne komisiis la veturigiston, ke li veturigu ilin al la patrino de Jozef; sed ili jam staris antaŭ la domo de sinjorino Kelderman kaj eniris ĝin.

— Ĉu vi ne intencis tuj iri al la patrino de Jozef? demandis la vidvino.

— Jes, sed mi ne komisiis la veturigiston, ke li veturigu nin tien. Ni iros al ŝi post horeto.

Berta eniris sian ĉambron kaj tiris kun si Jozefon.

Ambaŭ sidiĝis sur la kanapon. Berta demandis:

— Ĉu vi memoras ĉi tiun ĉambron, Jozef?

— Jes, ĉi tie vi donacis al mi la luksajn vestojn.

— Kaj tra tiu fenestro ĵako estis jetata eksteren.

— Sur miajn brakojn... La kompatinda besto!

Mi dezirus, ke ĝi ankoraŭ vivus.

— Nun ni estas denove kune, ŝi diris, tirante lin al si.

Ili aŭdis, ke en tiu momento la vidvino mal-

supreniris kaj ke ŝi fermis post si la pordon.

— Sinjorino Kelderman faras komision; eble ŝi iras al la spicisto, sed baldaŭ revenos. Kiel feliĉe estas, Jozef, ke fine vi estas libera!

— Jes, nun ni ne plu devas stari antaŭ feraj

kradoj, kiuj malebligas al ni proksimiĝi unu la alian.

—

Eduard, portante grandan bukedon, alproksimi-

ĝis al la domo de sinjorino Kelderman kaj estis

sonorigonta, kiam li retiris la manon, ĉar sam-

momente la vidvino kuretis al la pordo por ĝin

malfermi. Ŝi aspektis iom embarasita kaj diris:

— Estas feliĉe, ke mi vidis vin ĝustatempe,

kaj ke mi malhelpis vin sonorigi.

— Kial do mi ne sonorigu? demandis Eduard.

— Sekvu min, kaj mi klarigos tion al vi.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scilgoj) de ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde legeble (precipe nomoj).

Eŭropo.

Aŭstrio.

Lin. 29. kaj 30. 1. parolis s-ro Smit el Haag antaŭ la polica kaj neŭtrala societoj. Li interese parolis pri Nederlando kaj poste deklamis siajn poemojn.

Wien. Socialdemokrata Esp. Federacio (SEFA) aranĝis pli ol 10 novajn kursojn. Samtempe ankaŭ estas aranĝita kurso por kursgvidantoj.

Ĉeĥoslovakio.

Praha. Rondeto de Esperantistinoj aranĝis 23. 1. amikan kunvenon kun amuza programo. Ĉeestis proksimume 90 p. Oni bone amuziĝis.

Libera urbo Danzig.

Zoppot. Loka grupo estas fondita. Kaŭze de iniciato de la loka UEA-del. s-ro B. Wolkeiser, Zoppoter Zeitung raportas nun regule pri Esperanto.

Finnlando.

Helsinki. Ĉe universitato okazas kursoj por ĝeneraliistoj. La kursprogramo enhavas interalie ankaŭ instruadon de nia lingvo.

Francujo.

Paris. 29. 1. en kunveno de la grupo, japana samideano s-ro Hesegai faris interesan paroladon pri Japanujo kun filmoj. En gazeto L' Oeuvre de 31. 1. aperis artikolo pri Esp. en Japanujo.

Germanujo.

Karlsruhe. Fremduloficejo skribis leteron al la delegito de UEA, per kiu ĝi sciigas lin, ke se li invitus la sekvonta esp. mondkongreso al Karlsruhe, ĝi (kiel korporacio) certe kaj per ĉiaj rimedoj subtenus kaj preparus ĝin.

Krefeld. Ĝeneralkunveno okazis 20. 1. Nova estraro estas elektita: Prez. Sommer, vicprez. Halfmann, kas kaj sek. s-ro Ems. Kunveno okazas regule jaŭdon 20 h en blindulejo, Marktstr. 230. Dum la lasta jaro aperis en la urbaj gazetoj 37 artikoloj. Komencas libervola instruo de Esperanto en popollernejo; partoprenas 15 knaboj. Gvid. instr. W. Queling.

Mannheim. Laborunuigo (loka grupo de GEA kaj lab. esp. grupo) festis 29. 1. la 40-jaran jubileon de Esp. kaj ĝia movado. Ĉeestis ĉ. 120 p., kiuj atente aŭskultis la diversajn paroladojn, deklamojn, kantojn, muzikaĵojn kaj aliajn prezentaĵojn.

München. En la ĉefstacidomo nun granda vitro-aŭfio atentigas pri la ĉi-tiaj kunvenoj. Ĉeestis 30 p. Oni legis la unuan parton de la poemo „La Alta Kanto de la Amo“. Poste okazis amuzado. Rejnstelo elpendigis kestojn sur la muro de sia ĉjo kontraŭ la ĉefstacidomo. En la keso oni legas la lastajn scilgojn pri nia movado. Ŝatinda s-ano pastro Mommerly donacis al la grupo 15 librojn por la biblioteko de la grupo.

Rheydt. Rejnstelo 3. 2. en Bahnhofhotel (Stacidoma hotelo) havis sian monatan kunvenon. Ĉeestis 30 p. Oni legis la unuan parton de la poemo „La Alta Kanto de la Amo“. Poste okazis amuzado. Rejnstelo elpendigis kestojn sur la muro de sia ĉjo kontraŭ la ĉefstacidomo. En la keso oni legas la lastajn scilgojn pri nia movado. Ŝatinda s-ano pastro Mommerly donacis al la grupo 15 librojn por la biblioteko de la grupo.

Polujo.

Dabrowa-Gornicza. 23. 1. okazis prelego de s-ro Czechowski pri la temo: Esp. kaj la Lab. Junularo. Ĉeestis pli ol cent junuloj.

Krolewska Huta. „Rondo Esp.“ aranĝis 29. 1. danfeston. Partoprenis 120 p. Kurso por komencantoj komenciĝis 1. 2. en lernejo 12. Partoprenas 8 p. Gvidanto s-ro Kolodziej. La komencita kurso por ĝeneruloj pli grandigis de 30 al 48 p. — 2. 2. okazis jarkunveno de

— Ĉu okazis io pri Berta?

— Jes.

— Ĉu ŝi denove malsaniĝis?

— Ŝi ne malsaniĝis; io alia okazis, krom tio ŝi ne atendis vin hodiaŭ, ĉar estas jaŭdo.

— Ĉu Berta ne estas hejme?

— Jes, sed ŝi ne estas sola...

— Ĉu tiuj amikinoj venis denove ĝeni ŝin?

— Iu alia estas ĉe ŝi.

— Kiu do? li demandis kun miro.

— Jam sekvu min, kaj mi sciigos al vi pri io, kio vin surprizos...

Senbrue ili supreniris.

— Sekvu min en mian ĉambron! flustris la vidvino.

Ili eniris la cititan ĉambron, kaj la vidvino diris hezite:

— Mi jam diris, ke mi parolos pri io, kio surprizos vin; sed eble vi ankaŭ ekkoleros.

— Kontraŭ Berta?

— Jes; sed mi povas certigi vin, ke ŝi ne estas kulpa.

— Ĉu denove ŝi preparis al mi unu el siaj strangaj surprizoj?

— Kutima surprizo ĝi tute ne estas...

La vidvino estis tre nerva. Ŝi ne sciis, kiel klarigi al li la teruran sekreton. Sed ĝi ne estis plu kaŝebla, ĉar se Eduard enirus la ĉambron de sia fianĉino, li tuj malkovrus la veron, sed tiun subitan malkovron ŝi volis eviti. Ŝi volis iom post iom antaŭprepari la kompatindan studenton pri la bato, kiu lin trafos. Sed nun, troviĝante vizaĝon kun vizaĝo kontraŭ la fakto, ŝi ne povis trovi la necesajn parolojn, kaj tion rimarkis Eduard. Li diris:

— Diru tuj, kiu nun estas ĉe ŝi!

— Tion mi diros. Sed antaŭe sidiĝu, por ke mi kviete kaj klare povu komprenigi al vi, kial Berta nun ne estas sola.

Eduard jetis la bukedon sur la tablon dirante:

Rondo Esp. kaj oni elektis jenan estraron: Prez. Kolodziej, vicprez. Gerlich, sek. Kedzior, kas. Staniek. Rondo Esp. nun havas 56 membrojn.

Kalisz. En „Express Kaliski“ la estraro de loka Pola Soc. Esp. dankas publike al s-ro lerneja insp. St. Glinicki, al ĉiuj lernejoj direktoroj kaj speciale al dir. Koszowski pro ilia favoro por Esperanto. La sama gazeto en n-ro de 31. 1. enhavas ampleksan artikolon de S. Grenkamp pri Pola literaturo kaj esp. movado.

Svedujo.

Malmo. Klubo jarkunvenis 27. 1. Oni elektis jenan estraron: Prez. S. A. Svensson, vicprez. Ernst Andersson, sek. Erik Andersson, kas. Aug. Larsson. Du kursoj funkcias. kiujn gvidas s-ro Ernst Andersson.

Stockholm. En januaro la konata propagandisto por Pan-Eŭropo, s-ro Max Rath, paroladis pri Pan-Eŭropo kaj ankaŭ varme rekomendis la mondlingvan ideon. precipe Esperanton. — La ĉi-tiaj gesamideanoj havis sian jarkunvenon kun sekvanta festo en „Internationella Klubben“. Post muzikaĵoj estis prezentata Esp.-dialogo verkita de s-ino Widström, en kiu s-ino Widström ludis la „reĝinon de l' tempoj“ kaj l-ino Jung (tratinno de la eldonantoj de Heroldo) „Esperanton“.

Stenografio.

Resumon en Esperanto

publikigas la tre interesa monata fakrevuo „Deutsche Kurzschrift“ (Germana Stenografio) en Eiberfeld, Charlottenstr. 72. La revuo estas presita en kutimaj literoj (ne en stenografiaj) kaj ne propagandas unu difinitan sistemon, sed pritraktas la tutan fakon de stenografio. Abono duonjare (6 kajeroj) rmk. 3 —, jare (12 kajeroj) rmk. 5.50.

Bibliografio.

(Unuoble ricevitajn librojn, ne difektitajn per stampo „Recenz-ekzemplero“ aŭ sim., ni mencias, duoble ricevitajn ni mencias aŭ recenzas.)

Esperanto-Schlüssel. Ellersiek & Borel en Berlin SW 61 Wilmsstr. 5, ĵus reeldonis Esperanto-ŝlosilon por germanlingvanoj, en formato 7,5 x 11 cm kaj en amplekso de 32 pĝ kaj kovrilo. Antaŭ la milito, la „ŝlosilo“ estis en ĉiu lando la plej ŝatata kaj plej efika propagandilo. Oni povas esperi, ke nun ili same bone propagandos por nia afero. Prezo: rmk. 0.10, 10 ekz. 0.90, 100 ekz. 8.—

La Bonfaremaj Ligoj, 3 Avenue du Bois de Boulogne, Paris 16, eidonis unu 2-paĝan kaj unu 4-paĝan flugfoliojn en Esperanto. La celoj de la Ligoj estas plej subtenindaj; ĉiu ano devas promesi ke li penados por 1. ĉiokaze-ĝi kun boneco, 2. ne mensogi, 3. protekti malfortulojn, kunhelpi al malfeliĉuloj, 4. respekti maljunulojn kaj invalidojn, 5. esti ĝentila al ĉiu, 6. bone trakti la bestojn.

Novaj Amaj Poemoj de Jaime Grau Casas, Barcelona, Claris 72. Prezo unu peseto.

La volumeto bone presita kaj plaĉe aranĝita enhavas 20 originalajn versojn. Se verkisto sukcesas restigi ĉe la leganto la saman sentojn, kiujn li mem havis kreante la versojn — tio estas poezio, eĉ se mankas regula ritmo kaj rimoj, Rimoj ne mankas en tiuj ĉi versajoj, sed la ritmo estas parte tre arbitra. Tamen oni devas lasi la laŭdon: s-ano Grau Casas manipulas (kaj pri tio ekzistas neniu dubo) maistre nian lingvon; li kvazaŭ jonglas per ĝi, kaj kelkaj versoj, ekz. „Portreto de mia fianĉino“, estas belegaj kaj tute perfektaj ankaŭ koncerne la ritmon.

F. K.

El moderna hispana Parnaso. Tradukita de Julio Mangada Rosenörn. (Hispana Esperanto Biblioteko.) 32 pĝ. kaj kovrilo. Prezo 1.25 sv. fl. ĉe la aŭtoro en Madrido (Hispanujo), Glorietta de Bilbao 5.

Julio Mangada Rosenörn jam donacis al la esp. libraro kelkajn bonguste aranĝitajn verketojn. Ankaŭ la nova volumeto de Hisp. Esp. Biblioteko estas lia eldonaĵo; presita sur bona papero kaj ilustrita per belaj klišoj, kiuj nin konatigas kun fame konata „Giralda“ en Sevilla, kun fiera kastelo de Buiron apud Bilbao, kun mond fama mirakta Alhambro de Granada, kun interesaj populitaj ktp. Pro tiuj ĉi ilustraĵoj la libreto estas ornamo de ĉiu esp. biblioteko. La enhavo de la diversaj poemoj estas parte tre ĉarma.

R-ano.

— Ĉu mi devis aĉeti ĉi tiun bukedon por trovi ŝin ĉe iu alia? — kaj li estis rapidonta al la ĉambro de Berta. Sed la vidvino lin retenis.

— Kvietigu, sinjoro Stolk, kaj sidiĝu, por ke mi povu klarigi al vi ĉion!

Li sidiĝis, kaj la vidvino parolis plue:

— Kiam vi konatiĝis kun Berta, ŝi vin amas,

fio estas: ŝi vere kredis vin ami, ĉar ŝi estas knabino, kiu ne vendas sian amon. Sed ŝi estis juna kaj ne sciis, kio estas la vera amo. Ĉiam ŝi honeste kondutis, kvankam ŝi estis senpripensa pri multaj aferoj, kiuj tute ne tuŝas la amon. Ofte okazas, ke junulo konatiĝas kun knabino kaj ke li kredas ami ŝin. Sed kelkfoje veriĝas poste, ke tiu sento ne estis la vera amo, kaj estus saĝa ago, ke tiu junulo en tia cirkonstanco konfesu la veron, ĉar ne konfesante ĝin, li malfeliĉigus du homojn. Je la sama maniero povus okazi, ke knabino sin trompis, kaj ankaŭ ŝi estus saĝa konfesi al sia fianĉo, ke ŝi trompis sin. Ne ĉiu havas la kuragon konfesi tian malagrablan veron, precipe se li aŭ ŝi scias, ke dankemo ludas grandan rolon kaj ke estas preskaŭ neeble fari tian konfeson...

La vizaĝo de Eduard, kiu komence montris koleron, iom post iom sereniĝis, kaj sinjorino Kelderman daŭrigis:

— Berta estas unu el la knabinoj, kiuj sentas, kiom iu alia faris por ili. Berta neniam povus forgesi, ke vi dum la tempo, ke vi konas ŝin, estas kvazaŭ ŝia bonfaranto. Ŝi neniam konfesos al vi, al sia bonfaranto, la veron; ŝi silentos pri ĝi, ŝi oferos sin mem... eble por baldaŭ poste morti el kaŝita ĉagreno. Mi diras ankoraŭ unu fojon: Ŝi neniam volis esti malfidela al vi. Ŝi konsentos eĉ nun, fariĝi via edzino, neniam dirante al vi unu vorton pri la fatala amo, kiun ŝi sentas al iu alia.

— Do... ŝi amas iun alian?

— Jes.

— Kiun do?

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciligoj informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi ne konvenajn artikolojn.

Radio.

En Bilbao ni aŭskultas preskaŭ ĉiujespere la realsendojn de la germanaj radiostacioj Leipzig kaj Stuttgart, krom aliaj realsendoj de anglaj, francaj aŭ italaj stacioj. Mi pensis multfoje, aŭskultante Leipzig aŭ Stuttgart, ke eble oni povus iom paroli en Esperanto, ekz. anonci la programojn, kaj tio estus bona por la esp. propagando kaj agrablega por ni esperantistoj. En Bilbao kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj povus kompreni la esp. parolojn ĉ. mil personoj.

Mi bone komprenas, ke la du cititaj germanaj stacioj ne ricevas de ni subtenon nek anoncojn. Tamen, tial ke en aliaj eksterlandaj stacioj oni parolas en aliaj lingvoj, krom la nacia, eble oni povus fari la saman en Leipzig kaj Stuttgart. Oni mem, en la loka radiostacio EAJ II, anoncadis en Esperanto la stacion ĉiutage, de tempo al tempo, dum tri-kvar monatoj, ĝis mi soldatiĝis. Alia loka stacio, EAJ 9, anoncas de tempo al tempo la stacion en angla, franca kaj itala lingvoj, kaj en la unuaj tempoj ĝi anoncis ankaŭ en germana kaj vaska lingvoj.

Kiam hispanaj radioamatoroj aŭskultas italan stacion, ili komprenas sufiĉe pro la simileco de nia lingvo kun la itala. Preskaŭ la samo okazas al hispanoj, kiam ili aŭskultas Esperanton kaj, oni opinias, ankaŭ al italaj, portugaliaj kaj rumanaĵoj ne-esperantistoj.

En nia provinco multaj personoj aŭskultas la realsendojn de Leipzig kaj Stuttgart, ĉar la radiemo estas granda inter la loĝantaro, kaj la regiono estas tre loĝata. Posedantoj de du- aŭ trilateralaj aparatoj kaj „galenistoj“ — kiuj estas la plej granda nombro, kompreneble — ĉiam aŭskultas realsendojn.

Se eble iu germana samideano povus sin okupi pri la anoncado en Esperanto (kvankam ne ĉiutage), mi konsilus al li la jenon: klara kaj malrapida elparolado, skandado de la silaboj.

Forigu preserarojn!

Mi miras, trovinte en la nova eldono de Fundamenta Krestomatio la saman preseraron sur p. 237 kiel en antaŭlasta eldono, nome

$$\frac{d \text{ phi}}{d h} = o, \text{ anstataŭ } \frac{d \text{ delta}}{d h} = o.$$

Temas evidente pri aĵa, ne lingva afero. Ĉu tia malgustajo devas resti eterne en la modela artikolaro?

Max Gilden, Brand-Erbisdorf, Germ.

Leterkesto.

F.M. en R. Bv. komunikis, ĉu vi forsendis viajn skribaĵojn registrite.

Th. N. en V. Dankon pro letero! Ĉar ĉiam ekzistas diferencaj opinioj, ankaŭ to'remo estos ĉiam necesa.

O.M. en P. kaj aliaj. Bone atentu vian afrankan tarifon! Estas ĉiam malagrabla pagi punafrankon.

R.S. en P. Dankon pro anonco kaj tre interesa manuskripto, kiun ni volonte publikigos.

La Floraj Ludoj.

Por la nunjaraj Int. Floraj Ludoj en Sóller (Mallorca) estas ankoraŭ dediĉitaj la sekvantaj premioj: 20. De kelkaj privataj samideanoj en Terrassa 50 pes. por temo libervola; 21. De „Katolika Mondo“ kvinjara abono por temo „Esperanto kiel moderna latino“; 22. De s-ro Joan Barceló el Palma 50 pes. por temo libervola; 23. De Crédito Balear el Sóller 100 pes. por temo libervola; 24. De Banco de Sóller 100 pes. por temo libervola.

Lasta templimo por konkursojtaĵoj verkoj estas la 28-a de februaro.

Adreso de la Floraj Ludoj: Delfi Dalmau, sekr., Carrer Valencia 245, Barcelona.

— Iun, kiu ne serĉis ŝian amon. Sed la amo estas io stranga, io kaprica; ĝi ne atentis la ĉirkonstancojn, nek promesojn pri fideleco, eĉ ne pri bonfaroj. . . . La okazo, mi pli volonte dirus: la fatalo, unuigis ilin. La amo ŝteliris en iliajn korojn, kaj mi ne scias, kiu el vi estas plej kompatinda.

— Mi jam konjektis, ke io okazis, kio povus nenigi mian kaj ŝian feliĉon, sed . . .

— Juĝu mem, ĉu ŝi estas kulpaj!

Eduard klinis la kapon kaj diris, montrante la bukedon:

— Rigardu . . . tiun bukedon mi estis portonta al ŝi! La doktoro hieraŭ denove ekzamenis miajn okulojn kaj antaŭdiris resaniĝon. Mi nun venis por proponi al Berta nian baldaŭnan geedziĝon.

— Ŝi ne rifuzos.

— Sed akceptos kontraŭ sia deziro. Mi tamen ne povas edziĝi kun ŝi, se ŝia koro apartenas al alia.

— Mi tre kompatas vin, sinjoro Eduard, sed denove mi ripetas, ke ŝi ne estas kulpaj. Ne tro koleru ŝin!

— Mi ne koleras, eĉ ne riproĉas ŝian konduton. Kial do ŝi ne konfesis al mi la veron?

— Ĉar ŝi tro multe estimas vin; ĉar ŝi tro multe sentas sin dependa de vi pro viaj bonfaroj al ŝi montritaj dum tiom da tempo. Ŝi mem-oferus sin.

— Tiam oferon mi ne volas kaj ne povas akcepti.

Li stariĝis, prenis la bukedon kaj diris:

— Mi foriras . . . mi skribos al ŝi . . . mi ankoraŭ ne scias ĉion, kion mi faros . . .

— Ĉu vi ne revenos al ŝi?

— Eble; tio dependas de la prenata decido. (Daŭrigota.)

Nova Esperanto-entrepreno.

Laŭ iniciato de kelkaj Koperhagaj esperantistoj estas fondita Skand. Reklam-Oficejo „Esperanto“.

Sub la gvidado de la konata samideano f-ino M. Noll, la prez. de Societo de Danaj Esperantistoj, la oficejo agas per kunlaborantoj kompetentaj pri negocaj aferoj kaj skandinava lingvoj, ĝi akcelas plifaciligi la interrilaton de la tutmonda negocistaro kun Skandinavio.

La organizo de la entrepreno estas bazita je la nura uzado de Esperanto: la hispana, japana aŭ pola negocisto sin turnas Esperante al la oficejo, kiu tradukas lian reklamon en dana, islanda, norvega kaj sveda lingvoj, publikigas ĝin en la konformaj gazetoj, presigas ĝin kiel belan prospekton aŭ broŝuron, prizorgas ĝian dissendadon al la koncerna branĉo je la ĝusta tempo ktp.

Ĉar la entrepreno, pruvante la praktikan uzablecon de nia lingvo, estas tre efika propagando, la oficejo esperas la moralan helpon de la tutmonda samideanaro. (Vidu la anoncon!)

P. Jørgensen.

Korekto.

S-ro lernejestro W. Hahn en Gohlis-Dresden petas nin korekti, ke en la programo de la Konferenco de Praha lia nomo estas erare presita Haan. S-ro Hahn parolados pri Internacia infankorespondado kaj porpaca edukado.

Verdkata Testamento

de Raymond Schwarz

ĉe Libreja fako de Heroldo: 2 rmk.

Skandinava Reklam-Oficejo „ESPERANTO“

Fredericlagade 6 II Kopenhago K, Danlando.

Poŝtĉeka konto: Kopenhago 1061.

Por reklamado kaj anoncado en Skandinavujo

oni sin turnu al nia oficejo, kiu prizorgas tradukadon, publikigadon, presadon kaj dissendadon de ĉiuj specaj reklamoj en dana, islanda, norvega kaj sveda lingvoj.

Nur akceptas tekstojn en Esperanto.

Prezoj tre moderaj.

Anekdotoj.

Ludoviko 14-a kaj la fripono.

Lutage fripono riskis deĥokigi murhorloĝon en unu el la ĉambroj de Ludoviko 14-a. En la momento, kiam li faris sian friponaĵon, la reĝo eniris. Sen konfuzo la ŝtelisto diris: „Mi timas, ke la ŝtupetaro gliifalos.“

La reĝo, konvinkite, ke tiu homo estas iu servisto, kiu devas depreni la horloĝon por ia riparo, tenis la piedon de la ŝtupetaro por eviti akcidenton.

Post kelkaj horoj oni plendis al la monarko, ke en unu el liaj ĉambroj horloĝo estas ŝtelita; sed oni ne scias, de kiu nek kiel.

„Ne eldiru ion!“ parolis la reĝo. „Mi estas kunkulpaj pri la ŝtelo: mi tenis la ŝtupetaron, kiam la horloĝo estis deprenata.“

El franca lingvo tradukis W. Gantzckow.

Vera okazintaĵo.

Rakontiita de s-ino J. Dublon.

Antaŭ kelka tempo vojaĝantoj plendis al la urbestro de malgranda urbeto, ke neniam droŝkoj staras antaŭ la stacidomo. La urbestro promesis aranĝi la aferon. Li do ordonis al la transportistoj, ke ĉiam almenaŭ unu droŝko staru antaŭ la stacidomo, alie ili perdus la koncesion.

Post kelkaj semajnoj vojaĝanto elvagoniĝis. Pluvis forte. Kun plezuro li vidis droŝkon starantan solece en la pluvveturo. Li ekkriis: „He, veturigisto, venu rapide!“

La veturigisto ne moviĝis, sed respondis flegme: „Mi ne povas veturigi vin, ĉar estas ordono de nia urbestro, ke ĉiam unu droŝko devas stari antaŭ la stacidomo. Nu, jen estas tiu ĉi droŝko!“

Serĉo.

A: Kial vi edzinigis malbelegan fratinojn de via mortinta edzino?

B: Ĉar mi nun jam kutimiĝis al mia ĝisnuna bopatrino.

Eldonisto serĉata

por vivokantetoj

Teksto de Cath. J. Roskes-Dirksen, Hago Fortepiana muziko de Hans Windisch-Sartowsky, Berlino.

Ĉio originale verkita kaj premiita de la Katalunaj Floraj Ludoj 1926.

Leteroj al la verkintino, Anemoonstr. 96, Hago (Nederlando).

Esperanta Foto Servo

interrilatas jam kun kunlaborantoj sur la tuta tero, deziras ricevi

aktualajn fotografajojn

de fotografantoj, ankaŭ amatoraj, kontraŭ pago por publikigo en gazetoj kaj ĵurnaloj. Petu jam hodiaŭ prospekton senpagan de

Josef Groebel, Eltzerhofstr. 5, Koblenz Germanlando.

Anoncetoj.

Anoncetoj kostas po enpresado kaj po komenciĝas 10 vortoj egalvaloron de 0.60 av. fk. — Anoncoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto) estas senpaga. Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperdato.

EDZIĜO. S-ro G. van Heek, Hengelo, Steynstr. 72, Nederlando, edziĝos 17. 2. 27 kun f-ino Annie Clewitz, Roden. Nian koran gratulon!

EDZIĜO. S-ro Henri A. Roelofs, ĉefestrarano de „Nederlanda Katoliko“, edziĝis 2. 2. 27 kun f-ino Gerardina van den Heuvel. Adreso: s' Hertogenbosch, Pelssingel 39, Nederlando. Koran gratulon!

LETERVESPERO. Esperanto Societo en Bristol aranĝos 2. 5. 27 letervesperon kaj petas la tutmondajn samideanojn sendi L kaj PK al jena adreso: Esperanto Societo Bristol, Folk House, College Green, Bristol, Anglujo. Ĉiuj sendintoj ricevos respondon.

POSTKARTVESPERO. La Esperanto Rondo Traunstein aranĝos meze de marto poŝtkartvesperon, propagandcele. Gesamideanoj, precipe eksterlandaj, estas kore petataj sendi Pl (bfl) al Esp. Rondo en Traunstein, Gasthaus Hölldräu, Bavarujo, Germanujo, Respondo estas garantiata.

MI VENDAS: Jarkolektojn de „Sennacieca Revuo“ julio-septembro 1924, „Sennaciulo“ de 1924—1926, „La Laborista Esp.“ de julio 1922—majo 1925 kaj „Heroldo“ de n-ro 21—100 (1925) kaj jarkolekto 1926. Ĉiuj gazetoj ankoraŭ estas tre bonegaj, S-ro L. Schuler, Freiburg Brsg., Kandelstr. 10, Germanujo.

NI SCIGAS ĉiujn gesamideanojn, kiuj responde nian aranĝon de „Heroldo“ sendis al ni L kaj Pl, ke pro alveno de pli ol 150 korespondantoj, ni ne havas la korpan eblecon respondi al ĉiuj almenaŭ unufoje. Ni petas pardonon. Instruistino Panova kaj Lakova, Sadovec, Bulgarujo.

Korespondo kaj interŝanĝo.

Ĉiu anoncanto devigas sin respondi almenaŭ unufoje, samtempe scigante, ĉu li deziras daŭrigon de korespondo aŭ ne; ĉiu anoncanto konsentas al ni la rajton publikigi lian nomon, se li ne respondos.

Skrubinto al anoncinto, plendante pri nerespondo, precize scilga la nomon de nerespondinto, la numeron de „Heroldo“, kiu enhavas la anoncon, la specon de sia korespondajo (L, PK, Pl ktp.), la daton, kaj ĉu la korespondajo estas registrita.

(Klarigoj: L = letero, PK = poŝtkarto, Pl = poŝtkarto ilustrita, PM = poŝtmarko, MB = monbileto, kĉl. = kun ĉiuj landoj, bfl. = [poŝtmarko] bildflanke.)

S-ro Julio de Gyarmathy, Novi Sad, Sterljačka 17, Jugoslavio, deziras interŝanĝi Pl kĉl. Nepre respondos.

S-ro Cesar Vanbiervliet, Wolvenstr. 5, Kortryk, Belgujo, deziras korespondi per Pl (bfl.) kĉl. Certe respondos.

S-ro Gustav Knapp, Otterbach b. Kaiserslautern, Germanujo, interŝanĝas PM germanajn kaj saarteritoriajn.

S-ro Singaj Juzo, Omita ŝi, Iakarasaka 1-47, Japanujo, deziras korespondi kĉl. Certe respondos.

Du fraŭlinoj deziras korespondadon kun tutmondaj gesamideanoj per Pl (bfl.) Certe respondos. Golob, Elisabethstr. 29 kaj Lackinger, Salzburg, Itzlingerhauptstr. 8, Aŭstrio.

Tri laboristoj serĉas korespondantojn, ekstereŭropajn, por regule korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: B. C. Maalgte, Douwelerstr. 5, Hoornerwerk, Deventer, Nederlando.

50 gelernantoj 12—25 jaraj deziras korespondi kĉl. Tujan respondon garantias s-ro B. Wotrich, Inatr., Magdeburg S., Friedenstr. 46, Germanujo.

12-jara lernanto Raoul Morén, Skeninge, Svedujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo.

16-jara studanto deziras korespondi kun lernejoj, kolegi-anoj ktp., kaj eble fondi korespondocieton. A. J. Hicks, 85 North Rd., Parkstone, Dorset, Anglujo.

Interŝanĝo de PM kaj Pl deziras Gotthard Michel, Niederoderwiß A 17, Germanujo. Respondas senprokraste.

La junuloj Penĉo Marinov, Velko Ivanov, Anka Dimova, Nasa Stanĉeva kaj Verka Stanĉeva, deziras korespondi per L kaj Pl kun la tutmonda esperantistaro. La adreso komuna: Komerckademo, Varna, Bulgarujo. — Tuj respondos.

Nerespondinto.

S-ro Jyry Korjula, Nurmes, Finnlando, anoncis en Heroldo en n-ro 29 (1926) sed ne respondis al skribintoj nek al la averto de la redakcio. Lia ago do estas malmorala kaj kompromitas nian movadon.

